

C

Tazio CARLEVARO
→parto 7: INTERLINGVISTIKO

LA CHAUX-DE-FONDS (urbo)

Signifa regiona urbo en Romandio, situanta en la kantono Neuchâtel, en la Neŭŝatela Ĵuraso (Svislando). C. havas 37'200 enloĝantojn (la kantona ĉefurbo Neuchâtel havas 33'000 kaj Le Locle 10'300 enloĝantojn; indikoj validas por la fino de 2005). Apud Ĝenevo kaj Laŭzano C. do estas la tria plej granda urbo de Romandio.

Laŭ iu etimologio 'Chaux' devenas de la kelta vorto 'calmis', kio signifas altebenan, senarbaran, kalvan paŝtejon ŝtonecan, dum 'Fonds' estis klarigita per fonto, sed laŭ alia interpreto havas la signifon devena el Fontainenmelon.

C. estas ankaŭ unu el la gravaj centroj de la Eo-movado, de esperantujo. En ĝi troviĝas, ekde la 50/60aj jaroj, →*Centro de dokumentado kaj esploro pri la lingvo internacia* (CDELI), ekde la 70aj jaroj ankaŭ →*Kultura Centro Esperantista* (KCE) kun ties *Internacia Feria Alternejo* (IFA) kaj →*Gastejo Edmond Privat* (GEP). Pro tio centoj da e-istoj vizitadis tiun nekutiman svisan urbon, kiu estas mondkonata kiel horloĝfabrika centro. Sennombraj Eo-gastoj kaj klientoj el Svislando, Francio, Germanio, Italio, Nederlando, Japanio, Orienta Eŭropo kaj aliaj landoj ripete venadis al C., ĉar la urbo estas por ili sufiĉe facile atingebla kaj ŝatata pro la bela pejzaĝo kaj bona aero.



Vidaĵoj de La Chaux-de-Fonds (fotis A. Künzli)

La esperantigita formo C. estas kontestata. Ĉar diversaj e-istoj ekuzadis kaj portis ĝin internacien, la toponimo *Ĉaŭdefono* estis registrita de PIV 2002 jene: „Romandia urbo, en kiu troviĝas gravaj interlingvistika biblioteko kaj Kultura Centro Esperantista (6°50'E, 47°06'N)”. En *SER*, n-ro 3/1989, Bernard Golden pritraktis la temon. Li skribis, ke ankoraŭ ne ekzistas principoj aŭ reguloj por esperantigi loknomojn el ĉiuj lingvoj kaj ke manke de gvidlinioj aŭtoroj esperantigas nomojn laŭ sia bontrovo. Golden menciis ankaŭ la du alternativajn versiojn *Ĉodefono* kaj *Ŝodefono*, kiuj tamen ne fariĝis popularaj inter e-istoj. Tazio Carlevaro uzis la varianton *ĉodfonano* en sia studo *Ĉu Eo postvivas la jaron 2045?* Iuj TEJO-anoj iam diris simple *Laŝo*.

Inter la pli signifaj eventoj okazintaj en C., kiuj ne estis rekte ligitaj kun la agado de KCE, GEP aŭ CDELI, estas menciindaj la seminario de TEJO/KER pri la temo ‘Neŭtraleco – ĉu alternativo al ideologioj?’ en 1993 kaj la 76a SAT-kongreso en julio 2003. Kadre de la urba biblioteko de C. ne nur situas CDELI, sed troviĝas ankaŭ *Fonds Edmond Privat*, kies taskoj estas kolekti kaj science prilabori la heredaĵon de la signifa romando kaj e-isto →Edmond Privat (1889-1962).

Dum multaj jaroj la bushaltejo apud KCE kaj la gimnazio portis la nomon de Eo.

La 16-an de junio 2004 en la kvartalo kie troviĝas KCE estis inaŭgurita la t.n. *Esperanta verdejo* (france: Verger de l’espéranto). La starigon de la eta arbaro je la honoro de Eo ĉeestis e-istoj, politikistoj kaj najbaroj, entute kvindek da personoj.


Evidente la nomoj de la horloĝmarkoj *Movado*, *Rado*, *Universo* kaj *Eterna*, kiuj estis sugestitaj de Philidor →Wolf, havas sian radikon en la lingvo Eo kaj en La Chaux-de-Fonds.

→Neuchâtel →Kultura Centro Esperantista
→Gastejo Edmond Privat →Biblioteko →CDELI

CIVILSERVO INTERNACIA

La C. (Libervola Civila Helpservo Internacia) estis starigita en 1920 de la kontraŭmilita kaj pacaktivula Asocio por Interpopola Reamikiĝo (Fellowship of Reconciliation, Mouvement International de la Réconciliation, Internationaler Versöhnungsbund, IFOR). De komence ĝi estis ankaŭ forte subtenata de la Societo de Amikoj (kvakeroj), kiuj estas konataj kiel kontraŭstarantoj de la militpreparado. Kvankam la C. estas la ido de tiuj du religie-spiritualisme bazitaj organizoj, la C. fariĝis religie kaj politike neŭtrala movado. Kiu ajn povis partopreni en la C., kondiĉe ke li aŭ ŝi sentas bonvolon aŭ sinceran deziron pri internacia paco. La servon ĝenerale partoprenis personoj, kiuj suferis malliberiĝon, ĉar ili rifuzis la armean deĵoron. Kiel skribis →Eric Descoedres en la broŝuro *Libervola Civila Helpservo Internacia* (bildon vd. sube), en Svislando la C., kiu kunlaboris kun →Ligo de Nacioj, fakte estis akceptita kaj subtenata de la svisa ŝtato kiel laŭleĝa kompenso de la militservo. Tiel ŝtataj entreprenoj kiel la poŝto aŭ la fervojo reduktis siajn prezojn aŭ disponigis siajn servojn al la C.-anoj senpage. Eĉ la armeo malavare pruntedonis ilojn, kovrilojn kaj alian materialon, kiam la C. sentis mankojn. Konkrete la C.-anoj helpis en la rekonstruado de vojoj post la milito (Francio 1929-21), ĉe la elrubigo de lavango kaj terfalo (Svislando 1924 kaj 1926), plibonigo de alpaj paŝtejoj (Svislando 1927 kaj 1929), purigado post inundoj (Liĥtenŝtejno kaj Svislando 1928), pluvegoj (Svislando 1931) kaj torentoj (Svislando 1932-36). Krom en Francio kaj Svislando, volontuloj el 35 landoj de la C. ekaktivis ankaŭ en Britio kaj eĉ en Hindio.


La C. (Service Civil International) ekzistas ankoraŭ nuntempe. La fondinto de la C., *Pierre Céréssole* (1879-1945), estis ano de ital-devena familio, kiu donis al la vaŭda kanton multnombrajn juristojn, pastrojn, kuracistojn kaj aliajn signifajn personecojn; la patro de Pierre, Paul Céréssole (1832-1905), eĉ estis membro de la svisa registaro (1870-75) nome de la liberaldemokrata partio kaj prezidanto de la Svisa Konfederacio en 1873.



Pierre Cérésolle




Anstataŭ flegi sian profesian karieron, Cérésolle, mem doktoro pri filozofio (1903), diplomita matematikisto-inĝeniero kaj docento ĉe la svisa politeknika altlernejo en Zuriko, preferis vojaĝi tra la mondo kaj engaĝiĝi en la porpaca agado, kiu inkluzivis la pledon por la rifuzo de la arma servo. Adoptinte la ideojn de Mahatma Gandhi (1869-1948) kaj la principojn de la protestantismo, Cérésolle starigis en 1920 la C. Per tio li ja rikoltis fortan kritikon, sed ankaŭ varman laŭdon: dum la generalo Henri Guisan (1874-1960) parolis pri li kiel „detruanto de la patrujo kaj de la armeo“, Romain Rolland (1866-1944) nomis lin „la plej alta konscienco de Svislando“. En 1936 Cérésolle aliĝis, kiel ankaŭ →Pierre Bovet kaj →Edmond Privat, al la societo de la kvakeroj. Kun Pierre Cérésolle kunlaboris ankaŭ lia frato Ernest Cérésolle, kiu estis kolonelo kaj kiu organizis la teknikan parton de la civilserva aktiveco.



Civilservanoj: Jules Gilliard, Claude Gacond, David Buhlmann

Kiel konanto de pluraj lingvoj Cérésolle fakte ne tiom sentis la neceson de internacia helplingvo. Tamen li ĉiam subtenis la ekziston de Eo kaj la zamenhofan ideon de la proksimiĝo inter la popoloj. Kun Privat, kiu en sia *Interpopola Konduto* (1931/35) mem pledis por la malaperigo aŭ reduktiĝo de la svisa armeo, Cérésolle estis en amikaj rilatoj, kaj pluraj e-istoj kiel →Claude Gacond, →Jules Gilliard, →David Buhlmann, →Max-Henri Béguin, →Edouard Waldvogel, →Eric Descoedres kaj aliaj estis aktivaj C.-anoj. Ankaŭ →August Forel sugestis la starigon de C. anstataŭ ŝtata armeo.



Broŝuro pri la Civilservo Internacia kompilita en Eo de Edmond Privat, Eric Descoedres kaj Jules Gilliard

Por ne veki ĉi tie la unuflankan impreson, ke ĉiuj e-istoj estas rifuzantoj de la armedeĵoro, utilas aldoni la informon, ke pluraj e-istoj servis en la svisa armeo, ĉu kiel simplaj soldatoj, ĉu kiel oficiroj (ekz. →Max Abegg, Martin Ardüser, Hans Bickel, →Bruno Graf, Heinrich Ringli, Ernst von May k.a.)

CIVITO ESPERANTA

La C. elkristaliĝis, fine de la 1990aj jaroj, komence de la 21a jarcento, kiel alternativa koncepto por la povostrukturo de la Eo-movado, en konsekvenca apliko de la t.n. 'raŭmismo' kaj reage al la (propradire) fortiĝanta krizo en UEA respektive en la 'tradicia' Eo-movado nomata 'finvenkisma'.

Difino, historio, ideologio: Laŭ sia memdifino kaj konstitucio, la C. (franglingve: Cité Espérantienne) konsistiĝas kiel „suverena kolektivo, demokrata kaj federa” (art. 1). Kiel konsorcio de liberaj establoj (kolektivoj, ne individuoj), kiuj decidis krei sinergion inter si, la C. celas formi la kernon de novtipa (aŭ alternativa) Eo-organizo kun „transnacia kulturo”, kiu sentas sin apartenanta al „senŝtata diaspora lingva grupo” kun „kolektiva identeco”, obeanta al „komuna kondukto” kaj agnoskanta „komunan arbitracian instancon”. Plue: „Ne estante ŝtato, la C. ne avidas politikan kaj ekonomian potencon, sed celas klerigan, edukon, kulturen evoluon, en komprenemo kaj toleremo rilate al la diversaj pensoskoloj al kiuj persone aliĝas la C.-anoj” (art. 2). La C. celas esti senteritoria „subjekto de internacia juro” por „plenumi suverenajn funkciojn” (art. 3) - analoge ekzemple al la Malta Ordeno. Laŭ propra kompreno la C. klopodas efektiviĝi la celaron de la t.n. *Pakto por la Esperanta C.*, sur kiu la C. estas rekte fondita, kiu difiniĝas surbaze de la t.n. *Kvintezo*, raŭmisme inspirita. Tiu Pakto estis lanĉita kadre de la Unua Forumo por la Esperanta C., kunvokita de Esperanta PEN-Centro kaj de Esperanto-Radikala Asocio (ERA), sub la prezido de György Nanovszky la 10an de aŭgusto 1998 ĉe CDELI en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, Svislando. Sed baldaŭ post la unua Forumo en 1998 ERA forlasis la projekton. La projekta teksto de la t.n. *Konstitucia Ĉarto de la C.* estis publikigita en *LF*, n-ro 181/1999. Ĝi

transformiĝis al definitiva projekto sekve al diskutoj kaj voĉdonoj en Karolovaro, Bohemio (julio 1999), kaj estis promulgita la 2an de junio 2001 en Sabloneto (Sabbioneta), Italio. La „leĝoj kaj normoj” (art. 5) de la *Ĉarto* referencas al la principoj establitaj dum UK en Bulonjo-ĉe-Marŝo (1905), al la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948), al la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj (Barcelono 1996) kaj al la Svisa Civila Kodo. La oficiala lingvo de la C. estas Eo, kvankam „laŭbezone” eblas uzi la francan lingvon por „diplomacia komunikado” (art. 6). La flago resp. blazono de la C. estas la Eo-flago laŭ adopto de la bulonja UK (art. 7), ĝia oficiala himno estas la poemo de L.L. Zamenhof 'La Espero' kun la muziko de F. de Ménil. La C. havas plurajn festotagojn (art. 9).

Civitaneco: Ĉiu loka, regiona, landa, internacia aŭ faka Eo-societo, ĉiu klubo, kulturcentro aŭ lernejo, ĉiu redakcio, eldonejo, scienca aŭ arta stablo, kiu rekonas sin en la Kvintezo kaj sekvas la aliĝan proceduron, rajtas aliĝi al la Pakto: „Rajtas je la civitaneco ĉiu individua membro de stablo aliĝinta al la Pakto, kondiĉe ke la persono mem petu civitanigi.” (art. 9)



La foto farita en Bratislavo je la 13a Internacia Literatura Forumo (1994) montras tri membrojn de la Esperanta PEN-Centro: Judit Felszeghy, Giorgio Silfer kaj István Nemere. (fotis A. Korĵenkov, *OdEo* 67/2000)

La civitaneco, pri kiu decidis la t.n. *Registro*, kiu estas la „fundamento de la civitana vivo” (art. 25), estas principe dumviva, sed eblas rezigni pri ĝi aŭ perdi ĝin (art. 9). Eksiĝojn kaj eksigojn verdiktas, en kazo de konflikto, la t.n. *Kortumo* (t.e. arbitracia instanco, art. 22) laŭ la peto de la koncernaj establoj. La

aliĝon de nova establo al la Pakto aprobas la t.n. *Forumo* („pariteta asembleo de la paktintaj establoj”, art. 14). Laŭ propra aserto la C. havas federalisman strukturon. La *Parlamento*, al kiu „apartenas la leĝodona povo” (art. 13), havas du branĉojn: *Forumo* (art. 14) kaj *Senato* (art. 16). La paktintaj establoj nomumas unuope la proprajn delegitojn en la *Forumo*, kie ili havas po unu voĉon. La individuaj C.-anoj elektas, ĉiun kvinan jaron, per ĝenerala kaj sekreta baloto, la membrojn de la Senato (entute 19); la ĉefkandidato de la gajninta listo fariĝas la *Konsulo* (art. 20) de la C., kaj la dua kandidato de la listo fariĝas *Vickonsulo*. La Konsulo, kiu estas la „oficiala reprezentanto kaj proparolanto”, kunvokas la Parlamenton kaj difinas la tagordojn, prezidas la parlamentajn kunsidojn, promulgas la normigajn aktojn de la Parlamento kaj plenumas per ediktoj kaj dekretoj la decidojn de la Parlamento” (art. 20). La konsulo kaj la vickonsuloj konsistigas la registaron, kiu estas nomata *Kapitulo* kaj kiu reprezentas la „ekzekutivan povon” de la C. (art. 19). Krome laŭ la Ĉarto ekzistas ankaŭ *Prefektoj* (art. 31), kiuj estas speco de ambasadoroj kaj komisiitaj „zorgi pri la interesoj de la koncernaj civitanoj, unuavice ilia informiteco, kaj pri la bildo de la C. en ilia lando“. Art. 30 priskribas la *Legaciojn*, kiuj zorgas pri la rilatoj „kun aliaj subjektoj de internacia juro” (kiel UN, EU, eklezioj k.a.).

Ekde oktobro 2002 eblis peti la civitanecon de la C. La civitanecon oni petas nur individue, skribe kaj tra la koncerna establo, aliĝinta al la Pako, kie la persono membras aŭ abonas. La establo plusendas la peton al la Civitana Registro, kun la propra garantio. Pro tiu garantio, la Registro malfacile rifuzos la civitanecon. La civitaniĝo estas senpaga, kaj en la C. ne ekzistas aliĝkotizoj. La C. informas la publikon pere de siaj informaj organoj (art. 27) kaj pere de la „retagentejo de la establoj en la Pakto por la Esperanta Civito”, *Heroldo Komunikas (HeKo)*, kiu ekaperis en marto 1999 kaj estas atingebla sub la retadreso <http://www.esperantio.net>. Laŭ art. 28 la C. ankaŭ „havas propran bankon (nomata Civita Banko), por enkasigi donacojn kaj legacojn, akcepti alpruntojn de civitanoj kaj establoj” ktp. Tie eblas ankaŭ legi, ke „la C.

povas produkti kaj vendi filatelajn kaj numismatajn valoraĵojn”.



Svisaj Eo-civitanoj (de maldekstre): Giorgio Silfer, Jean-Jacques Lavanchy, Andres Bickel (membroj de la Kortumo) kaj Dieter Rooke (senatano de la Esperanta C.)

Baza sinpravigo: En diversaj intervjuoj kiel ekzemple en *La Ondo de Esperanto* (3/2001 kaj 2/2003), →*Giorgio Silfer* (*1949), la ĉefiniciatinto (aŭ ‘patro’, ‘arkitekto’) de la C., diagnozinte krizon de la tradicia Eo-movado kaj distanciĝon de ĉi tiu movado disde la „Esperantio kiel socio kun komuna destino”, precizigis siajn tezojn kaj konkretigis la aspekton de la C.-strukturoj. Laŭ li organizo kiel UEA konstante regresas, dum komunumo kiel la naskiĝonta C. kiel konsekvenca apliko de la raŭmismo kaj kun pli demokrata organismo ol la tradicia UEA maturiĝas. „Esperantio troviĝas ofte ekster la UEA-sistemo (...), ekzemple ELTE”, notis Silfer en 1994. La C. ne estas faka asocio. UEA, kiu estas internacia neregistara organizo (NRO), povas laŭ la teorio de la C. kunezisti kun la C., same kiel SAT povas kunezisti kun UEA. Dum UEA estas pli porlingva realaĵo, la C. estas pli perlingva realaĵo, tamen la C. ne baziĝas ekzemple sur klasbatala fundamento. [UEA / Hodler enkondukis la nocion „Esperantio” en la jaro 1908 kiel sinonimon de UEA. Diference de la e-istoj, kiuj simple uzas Eon por kiaj ajn celoj, laŭ Hodler la „esperantianoj” estas Eo-lingvo-praktikantoj sed pli ligitaj per forta emocia sento de solidareco al la komunumo, →Antologio; la nocio Esperantio mankas en PIV].

Aliĝintoj: Dume aliĝis al la Pakto kaj estas en la *Forumo* i.a. la sekvaj establoj: Andaluzia Eo-Unuiĝo (Hispanio), Esperanta PEN-Centro (Svislando), Eo-fako de ELTE-universitato (Hungario), Itala Interlingvistika Centro (Italio), Kooperativo de →Literatura Foiro (LF-koop, Svislando), →Kultura Centro

Esperantista (KCE, Svislando), redakcio de *Heroldo de Esperanto* (Svislando), redakcio de *Literatura Foiro*, Bunta Mondo (Stefano Keller, Svislando) kaj kelkaj malgrandaj lokaj kaj fakaj organizoj en Bulgario, Francio kaj Italio. Silfer volis aligi ankaŭ la gazetojn *Ruslanda Esperantisto / La Ondo de Esperanto* kaj *Kontakto*, sed ne sukcesis. En 2004 la C. akceptis la aliĝpeton de Feminisma Esperanta Movado (FEM Francio/Svislando), Studenta Eŭropa Esperanto-Ligo (Italio) kaj TIETO-Instituto en Togolando. Reage al la strangaj okazintaĵoj ĉirkaŭ la fondo de la nova organizaĵo, la du ĉefaj iniciatintoj de FEM, la geedzoj Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, anoncis sian protestan aksiĝon el la fondita organizaĵo, kiel raportis *Libera Folio* en aŭgusto 2004.

En oktobro 2005 *HeKo* 279 publikigis la aktualan liston de la paktintaj establoj: Vraca Eo-Societo, *HdEo*, KCE, ASSI-skoltoj, *LF*, Razgrada Eo-kulturdomo, LF-koop, TEV, IIC, DB, Espéranto Charente, Esperanta PEN, AEU, Padova LG, Bon-Apetit, CES, TIETO, STELO, FEM, Koop. Esperanto15.

Pro diversaj „kritikaj artikoloj”, „mensogoj kaj „misfamigaj kampanjoj“ pri la C. aperintaj en *Libera Folio*, la kapitulo de la C. rezolucie decidis en 2005 „ekskomuniki” la redaktoron de *Libera Folio*, Kalle Kniivilä, kaj deklari lin „persona non grata”. Pro samaj kaŭzoj cetere ankaŭ la hungara e-isto László Szilvási, iama redaktoro de *Eventoj*, estis proklamita kiel tia.

Personoj: Kiel „konsulo”, oficiala reprezentanto kaj parolanto de la C. havanta gravajn povojn, oficas Walter Ŝelazny (Pollando/Francio), kiel „vickonsulo” Ljubomir Trifonĉovski (Bulgario); „senatanoj” estas Marie-France Conde Rey (Francio), Judit Felszeghy (Hungario), Anatolo Gonĉarov (Ruslando), Perla Martinelli (Italio/Svislando) k.a. (ili apartenas al la t.n. „verda grupo”), Marco Picasso (Italio), Dieter Rooke (Germanio/Svislando) k.a. („ruĝa grupo”), Vinko Oŝlak (Slovenio/Aŭstrio), Anna Laszay (Hungario) k.a. („blanka grupo”). Unuopaj senatanoj (kiel Ŝelazny, Trifonĉovski, Conde Rey, Oŝlak k.a.) estas ankaŭ membroj de la „kapitulo“ de la C. Zofia Banet-Fornalowa (Pollando), Jean-Jacques Lavanchy (Svislando), Giorgio Silfer

(Italio/Svislando), →Andres Bickel (Svislando), kiu kiel juristo helpis redakti la proponon por senata reglamento, kaj György Nanovszky (Hungario) estas membroj resp. vicmembroj de ĝia „kortumo“.



C.-anoj Anna Laszay, Ljubomir Trifonĉovski, Walter Ŝelazny

Kritiko: Laŭ konstato de la retenciklopedio *Vikipedio*, ne ĉiuj e-istoj konsentas kun la apero kaj ekzisto de la C. La projekto neeviteble provokis krom aprobo ĉe iu eta grupo de samideanoj ankaŭ fortan kaj parte ege sarkasman polemikon kontraŭ ĝi. Al la fruaj kaj ĉefaj kritikantoj de la projektoj de Giorgio Silfer kaj de la C. apartenas ekzemple la hispano *Jorge Camacho* (Georgo Kamaĉo), kiu famiĝis ne nur pro sia membreco en La Ibera Skolo, sed ankaŭ pro sia pamfleta krimromano *La Majstro kaj Martinelli* (Saarbrücken 1993), per kiu li persone kvazaŭ venĝis sin kontraŭ pli frua laŭdira kalumnio flanke de Giorgio Silfer kontraŭ Camacho. Lia dua paskvilo sub la titolo *La liturgio de l'foiro* (Budapeŝto 1993, KEF 2000) estas firme direktita kontraŭ la C. kaj la „foirismo” de Silfer & Martinelli. Por Camacho la C. estas ne nur sekto ene de la Eo-movado, sed la verktalenta hispano vidas en ĝi „embrieton de surogata nacio, de virtuala ŝtato”. Laŭ Camacho la C. signifas ankaŭ la „plej freŝan ekzemplon de ekspansiismo, de lukto por povo kaj potenco”, kie „la reĝisorojn de la ĉi-supre priskribita burleskaĵo (t.e. la Kvintezo, Ĉarto ktp.), en sia avido potenci kaj akapari atenton (...), karakterizas (...) kolektiva, kooperativa paranojo.” Por Camacho en la kazo de la C. „temas pri denaske morta projekto, sed ĝia plur-akta prezentado (en teatra senco) al la publiko povas damaĝi serioze la internan kaj eksteran agadojn de UEA.

La farojn de la C.-anoj Camacho, kiu ne nur mokis pri la tipe silfereca lingvaĵo tuj rekonsebla, nomas „religiecaj“, la tuton „farso“, en kiu „ankaŭ naivuloj bonvenas, kondiĉe ke ili akceptas la kvin tezojn, dogmojn aŭ aksiomojn de familio Ari-Martinelli”.

Flavio Rebello – la ĉefredaktoro de la interreta portalo Ĝangalo, suspektis, ke la C.-anoj volas transpreni la gvidan rolon, kiun ĝis nun UEA ludis, kaj ne kredas je la estonteco de tiu nova organizo, kiu laŭ li en si mem ne estas bezonata. Lin ĝenas la fanfarona terminologio de la C. kaj la devo voĉdoni por individua e-isto, kiu nomas sin konsulo, kiu supozeble nenion faras nek por unuopa e-isto nek por la Eo-movado kiel tuto. Por Rebello la C.-anoj „simple estas grupo de personoj, eĉ bonintencaj, kiuj ludas ‘mian lingvon - mian patrion’ (...), sed kiuj montriĝas same palaj, kia estas la Civita koncepto” mem.

Inter la aliaj seriozaj kritikantoj de la C. troviĝas ankaŭ *Detlev Blanke* (Germanio), kiu opinias en sia artikolo *Ĉu manifesti kaj civiti* (aperinta en *Esperanto/UEA*, majo 2001), ke la C., kiel ĝi prezentas sin kun sia Konstitucia Ĉarto, riskas ridindigi Eon en neesperantistaj medioj. Blanke krome riproĉas al la C.-anoj, ke ĉi tiu iniciato nur pliprofundigus la jam sufiĉe disvastigitan opinion, ke la e-istoj estas neripareblaj, neseriozaj sektuloj kaj revuloj, kun kiuj ne havas sencon eĉ ekdiskuti.

Interesajn vidpunktojn pri la C. esprimis fakulino pri la internacia juro, d-ino *Maria Rafaela Uruenja* (Hispanio). En sia artikolo (*Esperanto*, n-ro 1140) ŝi klarigis, kial la C. ne povas esti subjekto de internacia juro kaj ĝia civitaneco ne estas vere agnoskebla titolo. Por havigi al si mem subjektecon internacian, ne sufiĉus subskribi pakton aŭ ĉarton fundamentan, sed necesus plenumi kelkajn kondiĉojn laŭ la tradicio de la internacia juro.

Nelaste, *Jouko Lindstedt* (Finnlando), kuniciatinto de la Manifesto de Raŭmo (1980), riproĉante al la nuntempaj raŭmistoj, ke intertempe ili definitive forlasis la koncepton de la origina raŭmismo kaj eĉ perfidis la Manifeston de Raŭmo, vidas en la C. la provon de la (eksaj) raŭmistoj „uzurpi la koncepton de ‘Esperantujo’”. Cetere Silber konsideras, apud aliaj dokumentoj, la leteron de L.L. Zamenhof al A. Kofman (1901.05.28)

kiel „fundamentan tekston de raŭmismo” (*HeKo* 129/2001, reta eldono); en komento aperigita en *LF* 190/2001 Silber celis pruvi, ke iuj eldiroj de L.L. Zamenhof, direktitaj al Kofman, konformas al la „praraŭmismo” de la aŭtoro de Eo.

La renoma tiĉina psikiatro → *Tazio Carlevaro* konsideras ĉiujn tiujn kritikojn kaj atakojn sensecaj kaj la akra, agresema kaj senkompata tono kontraŭ la C., LF-koop kaj ties aktivuloj nejusta, nepravigita, eĉ se la politikoj de la C. kaj de LF-koop kondukos laŭ li al nenio. En la nuna malkresko de la Eo-movado, Carlevaro observas, ke LF-koop kaj ĝiaj ĉirkaŭantaj organizaĵoj, celas haltigi la malaperon de la movadanoj, kaj per prestiĝopolitiko, kaj per servo-propono. La C. estus la ĝenerala aŭ strategia kadro (la ‘ideologio’) de tiu politiko. Tio demonstrus, ke LF kapablas agi kaj utilitarisme, kaj prestiĝo-serĉe. Do laŭ Carlevaro ĝi ne estus nur kviete raŭmismo, sed ankaŭ iom UEA-eca... Malgraŭ ĉiuj kritikoj, atakoj kaj eble ankaŭ ĵaluzoj, LF-koop almenaŭ kapablis ion konstrui, dum ĝiaj kritikantoj ne kapablis prezenti alternativojn. Laŭ Carlevaro la Eo-movado sociologie similas malpli al ‘popolo’, sed pli al sekto, aŭ pli bone, al ordeno. Iusence li komprenas, ke oni inventis ion kiel la C., ĉe kiu temas pri iaspeca radikala raŭmismo, t.e. maniero kultivi la e-istojn, kreante specon de identeco, de ‘ni-sento’, kiu supozeble estis elpensita de la Eo-sekcio de la Itala Radikala Partio (kiam LF transpaŝis al la organizado de tio naskiĝis malkonkordo kun la menciita sekcio. Tiuj malkonsentoj estus oftaj en *utopiaj* entreprenoj.) La inventojn de reprezenta registro, de parlamenta, de ĵuga instanco ktp. Carlevaro trovas tamen kuriozaj. Kaj li opinias, ke tio ne povas funkcii, pro la komplekseco de la inventaĵo kaj pro la liberecana kaj evidente iom anarkiista karaktero de la e-istoj. La provo reale funkcii tiujn aferojn okazigus verŝajne „atombombajn” konfliktojn. Sed laŭ Carlevaro tiuj klopodoj ĉiukaze jam ne plu influas la finan destinton de Eo (same kiel ekzemple la atingo de la nobelpremio ne multe helpus al la lingvo mem). Fone de la verŝajne baldaŭa malapero de Eo, kiun Carlevaro prognozas en sia studo *Ĉu Eo postvivus la jaron 2045?* (1999/2000), ankaŭ la C. ne reprezentus „miraklan eskapejon”; kun

iom da bonŝanco ĝi sukcesus nur iom malfruigi la neeviteblon.

Cetere ankaŭ →*Claude Piron* malfidas la elitecan disdividon inter 'ili' kaj 'ni', kiu estas praktikata de la raŭmistoj.

Krom la intelekta-akademieca analizo de la C. kaj de la emocia polemiko kontraŭ ĝi, aperis ankaŭ kritiko aŭ primokoj pri la C. en formo de poezio, kiel montras la ekzemploj de la artistoj *Viktor Aroloviĉ* kaj *Mikaelo Bronŝtejn* el Ruslando. La raporto pri la 76a Kongreso de SAT en →La Chaux-de-Fonds, kie la C. vane esperis povi gajni la sennaciecan asocion por siaj celoj, fariĝis en *La Kancerkliniko*, n-ro 107/2003, neevitebla satira komento pri la C. entute. Kaj la koncerna protokolo de la evidente naŭza diskutado pri la C. dum la bratislava SAT-kongreso en 2004 aperis en *Sennaciulo*, nov. 2004.

Sinteno de UEA: Oficialan asocian starpunkton UEA neniam esprimis. Koncerne la demandon de la rilato de la C. al la cetera Eo-movado kaj de la eventuala agnosko far ĝi, en intervjuo kun *Osmo Buller* en *Eventoj*, n-ro 178/2000, la tiama (kaj intertempe denova) ĝenerala direktoro de UEA konsideris la C. maksimume kiel fakan asocion, kiu laŭdezire povas aliĝpeti al UEA laŭ difinita aliĝ-proceduro. Persone Buller trovas stranga la strebon de la C. apartigi sin en ia fikcia landeto kaj opinias, ke la C. povus nur konfuzi eksterulojn pri la efektivaj celoj kaj motivoj de la e-istoj kaj firmigi la opinion, ke Eo ŝajne estas io sekteca kaj ridinda. Eviti sektecon kaj ridindigon de Eo estus la oficiala linio de UEA.

Reagoj de la C., kiu malkovris en la „bullerismo-kamaĉismo” la ĉefajn internajn personarajn problemojn de UEA, precipe lige kun la dua demisia krizo en la CO de UEA (Raŝić ktp.), ne mankis. Pere de ĉi-koncerna deklaro de la „Kapitulo” de la C. *HeKo* 189/2003 bedaŭris la „grandan potencokonflikton interne de UEA, kiu povas kaŭzi damaĝojn al tiuj servoj kaj eĉ kompromiti la bildon de Esperantio”. Kondamnante la „kalumniojn kontraŭ la C.” flanke de homoj kiel Blanke kaj Lindstedt, la (anonima) komentanto en *HeKo* pravigis memlaŭde la „sincerecon de la raŭmistoj kaj de iliaj konstruaj proponoj por la bono de la tuta Esperantio, kun pli ol 20-jara sindediĉa (kaj sensalajra) laboro kaj

gravaj atingoj” kaj konkludis la ŝancojn de UEA jene: „Kontraŭ UEA neniu aktivas pli ol UEA mem. La skismon preparas ne la raŭmismo, sed la bullerismo-kamaĉismo: kurioza mikso de ‘verda’ burokratismo kaj anarkoida egocentrismo.” Fine ni „ĝojas ke almenaŭ en la C. regas la harmonio kiu mankas en UEA”.

La eksa prezidanto de UEA, Kep Enderby, kiu estis aŭstralia politikisto, evidente iom simpatie ekrilatis al la ideoj de la C. aŭ almenaŭ al la Konstitucia Ĉarto, daŭre partoprenante kunvenojn de la C. Je la miro de la e-istaro, Renato Corsetti, ital-devena prezidanto de UEA, skribis en kontribuajo en la interreta novaĵejo *Libera Folio*, ke li sentas sin en UEA plene ĉirkaŭata de la raŭmismaj ideoj kaj per tio kvazaŭ rekte agnoskis la venkon de la raŭmismaj ideoj ankaŭ en UEA. Kiel *Libera Folio* en aŭgusto 2004 raportis, en la 89a UK en Pekino (2004) Corsetti ripetis sian konfesion, ke li estas profunde finvenkisma, samtempe kun la alvoko, ke necesus respekti tiujn, kiuj ne havas samajn ideojn, „ĉar ĉiu el ni faras ion valoran”. Dum iuj movadanoj interpretis la toleremon de Corsetti kiel sintenon almenaŭ ne rifuzi la C., iuj aliaj funkciuloj diris aŭ skribis en privata vidpunktesprimo, ke eblus simple ignori la C. kaj ke tio sufiĉus por la momento.

La sama *Libera Folio* aperigis en oktobro 2005 sub la titolo ‘Falsaj nomoj kaj veraj trompoj’ furiozan leteron de *Gian-Carlo Fighiera* (Italio), honora membro de UEA, kontraŭ la C. kaj Silfer persone, kiu kaŭsus sin malantaŭ deko da falsaj nomoj. En tiu letero la vidvo de la forpasinta redaktorino de *HdEo*, Ada Fighiera-Sikorska, publike mesaĝis, ke li sentas sin „senskrupule perfidita” „viktimo” post la transdono de *HdEo* al LF-koop. Pri la C. li skribis: „La ‘C.’ estas blufado kaj tial kompromitas Eon antaŭ la ekstera publiko: malantaŭ ĝi, ĝiaj surpaperaj societoj kaj pompaj organoj (‘suverena ŝtato, senato, tribunalo, kapitulo, fakultato’ kaj simile) troviĝas nenio.” Riproĉante al la C.-anoj, ke ili „volas anarkiisme detrui UEAn”, Fighiera aldonis, ke s-ro „Ari proponis ankaŭ al li subfosi UEAn por la simbolo de la ‘vertikala movado’, kiun li volas anstataŭi per sia ‘horizontala movado’.”

Plue: „Per ‘Heroldo’ Ari senĉese, senhalte dividas la e-istojn per polemikoj, kvereloj kaj skandaloj, ruze kaŝas la malvenkojn de ‘C.’ kaj de la apudaj fantasmaj asocioj (eksiĝoj, distanciĝoj, amasa perdo de abonantoj, mizera partopreno en aranĝoj kaj tiel plu), ĝoje reliefigas kaj ŝveligas malfacilaĵojn de UEA, sed akurate silentas pri ĝiaj sukcesoj. Kion konkrete faris tiu ‘C.’ por la disvastigo de Eo en la lastaj naŭ jaroj?” Fine Fighiera konsilis al la e-istoj: „estu singardaj pri la allogoj de la ‘C.’/Ari por eviti damaĝi al Eo kaj al ĝia movado; kaj por eviti esti mem trompitaĵ.”

Repliko: En sia replika kontribuo ‘Pri la C.: la unuan fojon publike’ en *La Ondo de Esperanto*, n-ro 2/2002, „konsulo” *Walter Ŝelazny*, „civitano kaj membro de la Evolu-Komisiono de C.” (en 2005), respondis al la (supre skizita) kritiko, kiun la C. devis alfronti. Unue li rifuzis la aserton laŭ li fontitan pro iuj misinformoj, ke la C. povus esti kontraŭ la Akademio de Eo, kiel iuj asertis. Koncerne la kritikon, ke la C. ridindigas Eon kaj ŝokas la e-istaron pro sia kvazaŭ-ŝtateco, Ŝelazny vidas en la C. unu eblan manieron por la Eo-movado organizi sin kiel subjekton de la internacia juro, se Eo kiel movado ne volas pereji post du, tri generacioj. En artikolo el la jaro 2000 (‘Ne eblas diri ion originalan tie, kie oni tion ne komprenas...’) Ŝelazny levis jenan seriozan demandon: „Kial do post 110 jaroj de la proklamacio de Esperantio la nombro de e-istoj estas la sama? Ĉu ne troviĝas inter la e-istoj almenaŭ unu honesta kaj inteligenta homo por tiri la konkludojn de ĉi tiu fakto kaj diri ke la varbado estas vana!” Koncerne la kritikon pri la deziro de la C. esti *la* reprezentanto de la e-istaro internacie, Ŝelazny, konstatante, ke reale la e-istoj ne ekzistas en la internaciskala publikeco, demandas sin, kiu nuntempe vere reprezentas la e-istaron kaj pridubas tiun rolon ĉe UEA, ĉar laŭ li ĝi estas nur unu el la multaj organizoj, kiuj reprezentas la e-istaron. Kvankam la jura subjekteco estis ĝis nun atribuita kutime nur al ŝtatoj kaj ŝtatsimilaj konstruaĵoj, Ŝelazny esperas, ke en ŝanĝiĝanta mondo povos okazi, ke tia organizo kiel la C. povus iam esti agnoskita kiel subjekto de la internacia juro. Resume Ŝelazny venis al la konkludo, ke dekomence la e-istoj ĝenerale ne multon komprenis pri la intencoj de la C. kaj be-

daŭris, ke en la movado regas laŭ li la „dikta-turo de plebo”. Li alvokis tiujn propagandistojn, kiuj ne volas kompreni la aferojn, foriri en la ombron de la historio.

En alia artikolo sub la titolo ‘Por ke la e-istoj ne pereu antaŭ sia morto’ (*LF* 200/2002) Ŝelazny ankoraŭfoje klopodis pravigi la celojn, utilon kaj neceson de la C. kaj avertis, por elimini ĉiujn miskomprenojn, ke ĝi „detruas nenium elementon de la ekzistanta Esperantio, nur plifortigas ĝin”. Laŭ li en la koncepto de la C. „aperas du realaĵoj: unua – la spirita, dua – la materia. La spirita estas ‘senterritoria respubliko de la Eo-popolo’. La materia estas la institucioj de la C. kiel Senato, Forumo kaj aliaj”. Ŝelazny konfirmis, ke „la C. agas en federa strukturo, tio signifas surbaze de la libervola asocio de ĉiuj organizaĵoj kaj individuoj, kiuj bezonas havi komunan forumon”, ĉar „en la intereso de la C. oni bezonas fortajn asociojn”. Kio ne estas bezonata estas tiaj asocioj, „kiuj volas centriĝi piramide la tutan e-istaron laŭ unusola modelo, eterne ĝusta, ununura.” Per tiu rimarko Ŝelazny klare kritikis organizon kiel UEA, kiu laŭ li iom naive proklamas, „ke nia afero venkas”, dum en gravaj dokumentoj ekzemple de la Eŭropa Jaro de Lingvoj (proklamita en 2001) mankas la vorto Eo. Por Ŝelazny la C. estas ankaŭ respondo je la „krizo de Esperantio”. Li montris sin konvinkita, ke „oni ne povas eterne devigi e-istojn pagi kotizojn, pli kaj pli kreskantajn”, sed „Esperantio devas trovi iun formulon pli adekvatan por ĉiuj, respektante la diversajn konceptojn strukturajn kaj strategiajn”. Alivorte: necesus doni al la e-istoj utilon. Necesus ankaŭ respekti la „dignon de tiuj, kiuj ne plu estas eternaj komencantoj”, por eviti, ke „ni e-istoj, post du, tri generacioj pereos”. En la C. Ŝelazny vidas „mutualan organizon, kie oni helpas unu la alian”, pere de „servoj realigataj per niaj kooperativoj kaj per la banko de e-istoj”. Kaj „en nia entuziasmo por la fina venko” ne decus forgesi la verkon de Zamenhof. Ŝelazny lamentas kaj opinias, ke estas „fundamenta eraro de nia ĝisnuna strategio”, ke eĉ 115 jarojn post la naskiĝo de Eo „la plej gravaj verkoj de Zamenhof ankoraŭ ne estas tradukitaj en la naciajn lingvojn!” Pro tio „la C. volas reveni al la pli profunda analizo de la penso de Zamenhof”, kiu estis laŭ li

„multfoje deturnita pro ideologiaj konvinkoj”. Do la C., kiu „ne celas detrui ion ajn, ne turnas sin kontraŭ aliaj organizoj”, „invitas la e-istojn pripensi sian rolon en la 21a jarcento kaj deklari sin civitanoj de Esperantio”. La „ĉefa obstaklo por la venko de Eo” laŭ Ŝelazny estas „la supereco de la ŝtatnacia strukturo” de Eŭropo. Laŭ tiu ĉi tradicia strukturo daŭre valida „oni alkiutimigis la e-istaron ariĝi sub la ŝildo de piramida strukturo finvenkisma, kie ne eblis normalaj demokrataj manovroj”. Tial sekve al „unu el la bazaj konceptoj de la zamenhofa penso”, „ni devas reveni al la koncepto de paca kunekzistado de popoloj, kiuj ne povas dividi la politikajn landlimojn”. Konklude: Esti C.-ano de Esperantio signifas esti „plenkonscia e-isto”.

En *LF* 218/2005 Ŝelazny evoluigis la retorikon kontraŭ la ‘finvenkismo’ (kaj nepretervideble kontraŭ UEA) kaj la pravigon de la C. laŭ jena formulo: „Evidente la finvenkismo, kun sia tuta armilaro de politika neŭtraleco, burokratia centralismo, sociologia indiferento kontraste al kultado pri ‘lingvistoj’, plus cenzuro pri novaj homoj kaj ideoj en formo de silentado interna kaj kalumniado ekstera, neniom taŭgas por trovi respondojn al la demandoj, kiujn metas la postmodernisma mondo. La finvenkismo plu prezentas Esperanton kiel la biologian konservanton de la ideo de internacia helplingvo, Eo kiel ĉies dua lingvo estis iluzio de la *belle époque*: iluzio nova, justa kaj humana. Se la gvidantoj de la finvenkismo profitas el tiu iluzio, ili ne kondukas honeste al la Esperanta popolo. Per la C. Esperantio instituciigis kiel portanto de lingvo de specifa grupo, kvazaŭ-etna diasporo alkalkulebla inter la sociaj kaj kulturaj realaĵoj kiuj, male al etnoj, reproduktiĝas nur (en nia kazo, precipe) per kultura transdono. Tio igas Esperanton fenomeno unika, kaj tio ebligas reloki Eon kiel valoron de nia civilizo, kiel ĝuste la raŭmistoj klopodas.”

Bertil Nilsson, C.-vickonsulo pri kulturaj aferoj, rifuzis la vidpunkton, ke la raŭmismo povus esti sekto, ĉar laŭ lia kompreno raŭmistoj kaj raŭmismaj institucioj volas esti integra parto de la ĉirkaŭanta socio kaj ne apartiĝi de ĝi. Kaj *Anatolo Gonĉarov*, alia C.-ano el Ruslando, konfesis en sia meditado pri

hejmoj kaj teritorioj, kiujn la C. iam posedos (*LF* 205, p. 235), ke estas malfacile prognozi je kio kaj kiel la dume virtuala C. evoluos.

La agadoj de la C. estis rimarkitaj cetere ankaŭ de la paderborna kibernetikisto kaj e-isto Helmar Frank, kiu en sia bulteno *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft* (*GrKG/H* 4/2005) evidente vidas Svislandon kiel la spiritan deveno-patrujon de la C. kaj komentis la diskutojn pri la C. jene: „En diametre kontraŭa kontrasto (al la raŭmismo, germanlingve Raumismus) ekzistas la *finvenkismo* (germ. Finvenkismus), kiu celas la ‘finan venkon’, t.e. la nerenverseblan akceptigon de la propagandota neŭtrala lingvo kiel komuna lingvo de ĉiuj nacioj de la mondo. Pli modesta, sed iusence ankaŭ pli radikala estas la *civitanismo* (germ. Civitanismus), kiu ekde 1999 disvastiĝas inter e-istoj, kiu vidas la lingvoportantojn kiel potencialajn civitanojn de ŝtato sen teritorio (‘Civito’) kaj kiu intertempe konstruadas ĝin, tre celkonscie, elde Svislando. La tradicia, sendependa gazeto ‘Heroldo’, kiu aperas ekde sep jardekoj ĉiujn 14 tagojn, intertempe alprenis la funkcion de oficiala registara bulteno (germ. Regierungsamtsblatt) de la C.” (traduko el la germana lingvo de aK), kion Frank evidente bedaŭras. Krom la raŭmismo, finvenkismo kaj civitanismo Frank sugestis kvaran „lingvoideologion“, nome la t.n. „*eŭrolingvismon*“ (germ. Eurolingvismus) kiel sintezon inter la finvenkismo kaj la civitanismo. Ĝia celo estus akceptigi planlingvon por la teritorio de *Eŭropio* (germanlingve: *Europien*), sed ne surbaze de pacience atendata iniciato flanke de la establitaĵoj parlamentoj de Eŭropa Unio kaj de ties membroŝtatoj; nome la eŭrolingvismo imagas multe pli la alternativon de la formiĝo de propra „eŭropa lingvoparlamento“.

Reagoj en Svislando: Pro la fakto, ke la agado de la C. disvolviĝas grandparte en Svislando, kie troviĝas ĝia sidejo (La Chaux-de-Fonds), la svisaj e-istoj dekomence observis la aferon de la C. kun skeptiko. Jam antaŭ la promulgo de la C. (junio 2001) okazis la 12an de februaro 2000 en Berno renkontiĝo de svisaj e-istoj sub la aŭspicio de SES, kie *Bruno Masala*, prezidanto de la Eo-klubo en Metz (Francio), esprimis sian opinion pri la C. en la ĉeesto de Giorgio Silfer. Konstatinte

la ekziston de ideologia dualismo en la Eo-movado, Masala sin demandis, ĉu indus eviti ĝin, aŭ prefere utiligi ĝin, aŭ ĉu necesus elekti aŭ ne elekti inter finvenkismo kaj la raŭmismo, ĉu krome la C. kontraŭas la esperantisman idealon (interna ideo) aŭ ne kaj ĉu la C. entute necesas. → *Bruno Graf*, prezidanto de SES, kiu esprimis sin en tiu funkcio, dubis pri la indeco mem de la projekto, samtempe respektante kaj admirante la arkitektojn de la C., kiuj strebas al novaj vojoj rilate la disvastigon de Eo. Graf nomis la projekton „interesa intelekta fikcio, sed fakte nur vizio, aŭ utopio.” Kvankam la Eo-movado ŝajne stagnas, Graf timis, ke la iniciatintoj de la C. moviĝas mense en foran e-istan mondon. Dum li konsentis principe pri la esenco de la Kvintezo, la Pakton mem li rifuzis, pro tio ke aliĝinto ne povas facile retiriĝi el ĝi. Pri la Konstitucia Ĉarto, kiu cetere ankaŭ antaŭvidas la fondon de banko kiel financa instrumento de la C., Graf pridubis entute ĝian realigeblon (vd. *SES informas* 2/2000). En *SES informas* 5/2003 Graf konfirmis sian impreson, ke „la C. estas por multaj stranga fenomeno. La organizo aspektas kiel ombra kabineto, kun trajto fundamentista, ja sekteca”. Aliaj konsideris la okazigon de la „sesioj de la Civita Parlamento” en la urbodomo de Le Locle pura blufado kaj komedieca elitismo.

Plua evoluo: En 2005 oni povis legi en diversaj Eo-periodaĵoj, ke la C. kaj KCE ekaktiviĝis en Afriko por altigi la kulturalan nivelon de afrikaj e-istoj. Tiucele Silfer veturis al Togo lando por gvidi seminarion. Ĉiu tiu konkurenca engaĝiĝo kondukis al nova grava konflikto kun UEA, kiu havis Afrikan Oficejon en Lomeo.

Laŭ propra komunikado la C. „ekspaniis” ankaŭ al Ameriko, kie iu venezuela kooperativo aliĝis al la C.

Krome la C. intencas daŭrigi la laboron por krei sian propran leĝaron. La projektata C.-Kodo laŭplane anstataŭu tiujn partojn de la svisa civila kodo, kiuj ne konvenas al „la specifaj karakterizoj de la Esperanta Popolo”. En Malago en oktobro 2005 estis komunikite, ke la senato de la C. planas krei specialan komisionon, kiu unue devos „esplori la realan situacion en la esperanta popolo” por poste prezenti leĝopropozicion pri specifa esperanta familia juro.

Ĉar la C. ne estas kontenta pri la laboro de la Akademio de Eo, en kiu multaj nunaj akademianoj ne havus „raŭmisman lingvokoncepton”, la C. anoncis la intencon fondi propran, alternativan lingvonormigan institucion, revivigante la malnovan Lingvan Komitaton. (*HeKo* 294/2006).

Per la dubinda klopodo esplori kaj prijuĝi la t.n. ‘polajn eventojn’ de la jaroj 1984-88 lige kun la t.n. ‘puĉo’ en Pola Eo-Asocio de 1985, la C. falis en novan embarason. En publika cirkulero (aldonita al *Pola E-isto* 2/2006) sub la titolo ‘Pola Eo-Asocio pri ĵonglado per la «polaj eventoj»’ Stanisław Mandrak kaj Edward Kozyra, prezidanto kaj vicprezidanto de Pola Eo-Asocio, ofendite kaj konsternite kritikis en 2006 la farojn de la C. Al la memelektita ‘esplorkomisiono’ de la C. oni riproĉis, ke ĝia ‘konkluda raporto’ estas „frukto de ordinara mensogado kaj artifika prisilentado de la vero”, ke en ĝi „miksiĝas mensogoj kun duonveroj”, ktp. Krome oni sentis sin ĝenata, ke la C. „provas fari ordon en Pollando”, volante „plibonigi” la historion de la pola Esperantio, prijuĝi, verdikti, kondamni. La firma rifuzo de la „konkluda raporto” de la esplorkomisiono estis samtempe akompanita de akra protesto, nome de la ĉefa estraro de PEA, „kontraŭ tiu ĉi provo dividi la movadon kaj venenigi ĝian samideanan etoson.”

D

Maurizio (Maŭro) DE SASSI 1909-1997



D. naskiĝis kiel filo de tiĉinaj elmigrintoj, kiu frue perdis siajn gepatrojn kaj spertis la socian mizeron de sia tiĉina patrujo. Kun sia edzino *Helen Reber* (1907-96), kies gepatroj same estis elmigrintoj, D. fariĝis konvinkita pacaktivulo, migrema kaj sportema naturamiko. Lia iama laborloko kiel librotenisto ĉe la zurika maŝinfabriko Bührle en Oerlikon, kiu produktis ankaŭ armilojn, principe ne plaĉis al D., ĉar ideologie li sentis sin fremda en tiu branĉo. Tial ekestis en li la emo subteni porpacajn agadojn, inter kiuj li situigis ankaŭ Eon. Siajn konsilan kaj organizan kompetentecojn, siajn diversajn sciojn, konojn kaj spertojn, akiritajn ĉefe memlerne, D. disponigis al la naturamika movado (TANEF). Lia politika aktiveco esprimiĝis ankaŭ tra la Kolektivo E-ista Komunista (KEK), kie li kontribuis al la organo *Internaciisto*. En la svisa Eo-komunumo D. rolis ankaŭ kiel SAT-peranto, kiel kunlaboranto de KCE por ties kaskontrolo, kiel membro de la Kultura

Komisiono kaj kiel prezidanto de la Komisiono Eo lernejen. En Zuriko D. aktivis kadre de la loka grupo kaj estis UEA-delegito.

Kiel pensiulo D. fariĝis membro de la Svisa Partio de la Laboro (komunistoj). Lia fratino, Amalie D. (1910-96), edziniĝis kun la juda komunisto Theo Pinkus (1909-91), kiu estis konata aktivulo de la laborista kaj memadministrativa movadoj. Post sia elmigrado el Germanio (1933) Pinkus starigis servon por serĉi librojn. Kaj post la milito li konstruis kun sia edzino, kiu aktive dediĉis sin ankaŭ al la feminismo, en Zuriko kooperativan librovendejon pri la historio de la laborista movado.

→Naturamikoj →Politiko →KCE →Zuriko



Maurizio de Sassi kun Anna Gerber

Eric DESCOEUDRES

1910-1987



Eric Descoedres (dekstre) kun Yvonne Privat-Bouvier kaj Alfred Wenger

D. estis bankoficisto, kooperativano, sindikano kaj redaktoro. Kiel pacaktivulo li rifuzis en 1933 la armean deĵoron kaj sekve estis enprizonigita, senlabora. Li helpis al hispanoj dum la interna milito en Hispanio kaj al judoj dum la hitlera periodo. Sekve li komencis aktive kunlabori kun la →Civilservo Internacia kaj kun la movadoj kvakera kaj kooperativa, kiuj tiam en Romandio estis ligitaj al la socialismo. En 1937 li okupis la oficon de tradukisto ĉe internacia sindikato en Amsterdamo (Nederlando). Okaze de la militeksplodo en 1939 la familio revenis al Svislando. Ĉi tie D. laboris en laŭzana kooperativo kaj en 1945 trovis postenon en sindikato en Zuriko. Poste li akceptis la postenon de ĉefredaktoro de la revuo *Coopération*, la organo de COOP, kaj plenumis ĝin ĝis sia emeritiĝo en 1975. Paralele li ĉefredaktis la romandan gazeton *L'Essor* (1953-75).



La juna Eric Descoedres kun ties edzino

D. lernis Eon en sia junaĝo kaj estis membro de la bazela ES. Li tre bone regis Eon, kaj ankaŭ lia edzino scipovis ĝin. Dank' al li plurfoje aperis artikoloj pri Eo en la de li redaktataj gazetoj *Coopération* kaj *L'Essor* kaj ankaŭ povis esti publikigita la broŝuro en Eo *Libervola Civila Helpservo Internacia*. Kun →Edmond Privat, la antaŭa redaktoro de *L'Essor*, D. estis amike ligita kaj en frukto-dona kunlaboro. La SES-anoj konatiĝis kun D. ankaŭ pere de tradukoj, kiuj aperis en *Svisa Espero* (ekz. 1/1946).

→Civilservo Internacia →Ĵurnalismo →Privat

Erna DÖRING

*1920. Loĝas en Basel



Naskita en Bazelo, D. translokiĝis en februaro 1921 kun sia familio al Dresdono (Germana Regno). Ŝia patro estis germano kaj la patrino svisa. Tiam la patrino fariĝis e-istino, kaj pro tio D. ekhavis la unuan kontakton kun la zamenhofa lingvo. En 1926 ŝi partoprenis Eo-kurson. En 1929, pro malsano de la avo, kiu posedis entreprenon en Bazelo, la familio revenis al Svislando. Ĉi tie ŝiaj rilatoj kun la e-istoj dume estis interrompitaj. Ŝi devis frekventi la lernejojn kaj poste labori en diversaj branĉoj (en 1982 ŝi emeritiĝis de sia posteno en medicina eldonejo). Nur en 1966 ŝia patrino legis anoncon pri la tiama bazela ES. D. sekve kontaktis ĝin kaj ĝiajn membrojn. Dank' al korespondado ŝi rapide relernis la lingvon kaj fariĝis tre aktiva movadano. En 1976 ŝi akceptis la gvidon de la bazela EG, al kiu ŝi servis ankaŭ kiel Eoinstruanto. Ŝi ekrlatis kun la fervojista, laborista kaj naturamika movadoj, do kun

IFEF, SAT kaj TANEF, kies aranĝojn ŝi vizitis kaj sinergiojn ŝi utiligis. Ŝi fondis la lokan grupon de TANEF kaj oficis kiel ĝia internacia fakreferantino (1976-96). Ankaŭ la Naturamika Internacio agnoskis ŝin kiel internacian fakreferantinon por Eo. Krome ŝi transprenis la tajpadon de la revuo *La Migranto* (1975-79), kiun ŝi mem redaktis en la 90aj jaroj. Apud ĉiuj tiuj funkcioj ŝi ankaŭ estis la svisa gazetperantino de *Sennaciulo*. Ŝi helpis en la pretigo de butonoj por vestaĵoj, de gluinsignoj por aŭtomobiloj, de T-ĉemizoj ktp. D. sindone organizis multajn Eo-aranĝojn, lokajn, naciajn kaj internaciajn, naturamikajn, feriajn, migradajn, trilandajn kaj tiel do esence kontribuis al la firmigo de la Eo-movado en sia urbo. Kulminoj en ŝia organiza aktiveco estis la aparteneco al la LKK de la 64a UK en Lucerno (1979) kaj la kunorganizado de la SAT-kongreso en Bazelo (1981). En 1987, kunlabore kun KCE, D. helpis aranĝi ekspozicion pri Eo kaj interlingvistiko en la bazela universitata biblioteko. Ĝis 1989 ŝi redaktis ankaŭ la kluban organon *Kuriero de Esperanto*, fonditan de ŝi en 1981. Pro ŝiaj senlacaj kaj multfacetaj Eo-agadoj SES atribuis al D. en 2005 la honoran membrecon.

→Bazelo →Naturamikoj

Alfred Paul DUBOIS 1853-1918

Post la frekvento de la lernejoj en Le Locle/NE kaj studoj en la neŭŝatela universitato, D., filo de paciga juĝisto kaj oficisto pri komunuma registrado, fariĝis instruisto unue de la baza lernejo (1872-74), poste de la duagrada lernejo (1874-84), por fine transpreni la oficon de direktoro de la bazaj lernejoj en Le Locle, ĝis 1912. 1888-90 D. estis ankaŭ membro de la komunuma konsilio kaj kiel edukisto-pedagogo multe klopodis por la evoluado de la junularo. Aparte gravaj taskoj por li estis la instruado de la stenografio (Aimé-Paris) en la komerca lernejo kaj la reformoj de la franca ortografio - lia filino Louise (1881-1952) prov-adaptis la stenografian sistemon Aimé Paris al Eo (en 1908). Lin tre interesis ankaŭ la historio de la regiono, pri kiu li prelegadis, kaj natursciencoj lin pasii-

gis. Li simpatiis kun filantropiaj movadoj, kaj li estis unu el la fondintoj de la organizaĵo de feriaj restadoj por infanoj; ĝia kasisto li restis ĝis sia morto.

D. estis frua neŭŝatela Eo-pioniro, kiu lokiĝas tute komence de la svisa Eo-movado. *EdEo* notis: „Unua provo ekplanti Eon en la ŝtonan teron de Svislando estas parolado de D., direktoro de Komerca Lernejo en Le Locle, en 1898“ (laŭ alia fonto, sliparo Jakob, lia unua publika parolado okazis en 1902). Laŭ la sama fonto (*EdEo*) D. estis la frato de →Hans D., la fondinto de la ĝeneva EG La Stelo. Post la jarcenta ŝanĝo, D., kiu posedis la superan diplomon de Eo (Bielo 1911), aktive diskonigis Eon, organizante kursojn kaj fondante lokan EG. En sia agado D., kiu estis nomumita honora prezidanto de la lokla EG (1910) kaj honora membro de la neŭŝatela EG (1916), estis helpata de →Edouard Duccommun, Paul Humberst kaj Henri Favre, aliaj signifaj Eo-pioniroj de la Neŭŝatela Ĵuraso.

→Neuchâtel →Instruado de Eo en Svislando

Henri DUBOIS 1859-1949



D. studis en la industria kolegio de Le Locle/NE por fariĝi horloĝisto kaj instruisto en la horloĝa lernejo de Saint-Imier/BE kaj teknika direktoro en Vallée de Joux. Ekde 1911 li laboris en Ĝenevo en produktejo de altnivelaj poŝhorloĝoj.

Laŭ la kronikisto de la ĝeneva EG La Stelo (*SE* 5/1942), kiu ankaŭ konfirmis, ke D. el Le Locle/NE estis la frato de →Alfred Paul D., Henri D. eklernis en 1885 Volapük, sed baldaŭ forlasis ĝin, ĉar li opiniis ĝin netaŭga por

la internacia disvastiĝo. Leginte en 1895 artikolon pri Eo en la tiama tre disvastigata scienca revuo *La Nature*, D. reinteresiĝis pri la neŭtrala universala lingvo, mendis gramatikan libron ĉe la eldonejo Hachette en Parizo kaj sekvis Eo-kurson de →Edmond Privat (1903/4) en la Kristana Unuiĝo. Unue D., kies nomo aperis en la 10a nomaro de la SES-anoj en julio 1904, instruis Eon al sia propra familio: al la edzino, filo kaj liaj du filinoj, kiuj siavice baldaŭ ekparolis kaj propagandis la lingvon. Post sia translokiĝo de la Neŭŝatela Ĵuraso al Ĝenevo D. fondis en septembro 1905 la EG La Stelo, kies prezidanto li fariĝis - por 16 jaroj (en 1937 D. estis elektita honora prezidanto de La Stelo). En tiu periodo li partoprenis ĉiujn gravajn okazaĵojn de la Eo-movado en Ĝenevo. Ekzemple li apartenis al la organizantoj de la 2a UK en Ĝenevo. Dum multaj jaroj li estis helpata de sia samnoma filo, kiu en 1903 apartenis al la membroj-fondintoj de la EG Junaj e-istoj de Ĝenevo de Privat kaj Hodler. Dum la filo mortis tro frue, la du filinoj daŭrigis partopreni la agadon de la patro. La filino Stelle D. (1890-1974) apartenis al La Stelo dum pli ol 50 jaroj. Tiel la D.-anoj estas memorindaj kiel modela Eo-familio.


→Neuchâtel →Ĝenevo →Familioj




Henri Dubois

Edouard DUCOMMUN

1865-1951



En sia regiono D. estis konata kiel multflanka instruisto-pedagogo, socia aganto kaj organizanto, unue en Les Monts super Le Locle/NE (ekde 1884), poste en Les Brenets/NE (ekde 1904). Krome D. rolis ankaŭ kiel delegito de la Departemento pri publika instruado de la kantono Neuchâtel. Dotita per multaj intereso- kaj kvalitoj, D. aplikadis siajn talentojn en muziko, beleto, fiziko, kemio, fotografado, mekaniko, optiko. Li pionire inventis diversajn kuriozaĵojn kiel ekzemple elektran lumkaj sonsistemon el piloj, piedbatan ŝaltilon kaj fotoaparatojn, aŭ specialan printilon, kiu ebligis al D. produkti diversajn paperajn eldonaĵojn. Lia edzino, Rose Droz (1871-1949), kun kiu li havis tri infanojn, estis unu el liaj lernantinoj. D. estis vigla, entreprenema, muzikema, kantema kaj komunikigema tipo, kiu ŝatis esplori la lokan historion, prelegi kaj skribi gazetarajn artikolojn, vojaĝi al la najbaraj landoj kaj direkti kant- kaj muzik-societojn. Ankaŭ kiel favoranto de reformoj en la ortografio de la franca lingvo (1929/32), kiel utiliganto de la stenografio kaj kiel organizanto de ferijaj restadoj por infanoj aŭ kiel uzanto de mem preparitaj medicinaj receptoj sen la perado de farmaciisto D. restis en la memoro same kiel kontraŭulo de ĉiaj sociaj konvencioj neraciaj. D. postlasis specifan tag-libreton, en kiu li notadis legindajn informojn pri multaj regionaj eventoj kaj pri historiaj esploroj efektivitaj en neŭŝatelaj arkivoj kaj bibliotekoj. Pro sia gorĝsuferado D. emeritiĝis fine de 1923 kaj reinstaliĝis en sia domo en Les Brenets (ĉe la adreso Grande Rue 14).



Patro Edouard Ducommun kaj filo Félix



Muzikema familio Ducommun en Les Brenets (foto CDELI)

Kiel Eo-pioniro de 1899 unue en Le Locle, poste en Les Brenets, D. malfermis en Les Monts en aŭgusto 1903 la unuan eksperimentan Eo-kurson en publika baza lernejo. En tio li estis apogata de →Alfred Paul Dubois. Ankaŭ en Le Locle D. instruadis Eon al la publiko kun la helpo de sia kolego Paul Humberstet. En publikaj lokoj D. parolis pri kaj en Eo kaj tiel altiris la interesiĝon de aliaj personoj. Kiam en 1904 estis fondita la EG de Les Brenets, vivtenata kaj prezidata de D. mem dum du jardekoj, li oficis samtempe kiel vicprezidanto de la EG de Le Locle. Lia plej konata muzika Eo-komponaĵo *La Kapelo* eldoniĝis kun la permeso de Zamenhof en 2000 ekzempleroj (dua eldono en 1923) kaj estis kantata dum la 2a UK en Ĝenevo en 1906, kiun D. partoprenis. Dum la Ido-krizo (1907-08) D. energie luktis kontraŭ la skismaj tendencoj. En aprilo 1922 D. ĉeestis la internacian konferencon pri la instruado de Eo en la lernejoj en Ĝenevo kaj verkis, kun →Georges Stroele, detalan raporton, kiu estis transdonita al la Departemento pri publika instruado de la kantono Neuchâtel. Post la fondo de Unesko D. tie propagandis Eon, defendante ĝin kontraŭ konkurencaj planlingvoj. En 1949 SES nomis lin honora membro. Laŭ rakonto, komence de la jarcento, D. pentris la verdan stelon sur roko survoje de Les Brenets al la akvofalo Saut-du-Doubs, temas pri loko, kiun D. aparte ŝatis kaj volonte fotadis.

Lia filo Félix (1892-1990), kiu laboris kiel administranto en industrio, same korespondadis kun eksterlandaj e-istoj kaj mem propagandis Eon en diversaj medioj.

La 24an de aprilo 2004, okaze de jubilea kunveno de SES, ĉe la domo Grande Rue 14 en Les Brenets memorŝildo estis aldonita kaj inaŭgurita. La festparoladon prononcis Gilbert Déhon, prezidanto de la komunumo Les Brenets.

→Neuchâtel →Instruado →Familioj



Memorŝildo pri Edouard Ducommun ĉe la domo Grande Rue 14 en Les Brenets

E

Charles ECABERT

1913-1962



E. estis diplomita teologo (1938) kaj instruisto en Neuchâtel (de 1956). Lia profesia kariero kondukis lin al Bruselo (Belgio), Lugano/TI, Schwyz, La Chaux-de-Fonds/NE kaj Cernier/NE. Kiel filologo li instruis la latinan, grekan, francan kaj aliajn lingvojn en la latina kolegio (t.e. gimnazio Numa Droz) kaj en la supera komerca lernejo de Neuchâtel. E. ankaŭ talente muzikis, kaj en belaj versoj li celebris la geniecon de Mistral, la reviviganto de la provenca lingvo.

E. lernis Eon en 1959, ĝuste en la jaro de la Zamenhof-jubileo, ĉe →Claude Gacond kadre de kurso organizita en la porinstruista lernejo en Neuchâtel. Poste en unu el siaj klasoj en la duagrada lernejo, sekcio latina, E. komencis eksperimente instruadi la temon kiel plej bone verki franclingve pere de Eo-tradukoj. E., kiu cetere estis la kuzo de →Michel Frésard, rapide ellernis Eon, trapasante la superan diplomon, kaj tiel li faris relative rapidajn progresojn en mallonga tempo: en 1960 li organizis la trian manifestacion de la Komi-

siono Eo lernejen, kaj en 1961 li fariĝis prezidanto de EES. Aparte ŝatataj estis liaj prelegoj dum diversaj Eo-renkontiĝoj. En 1962 li transprenis ankaŭ la redaktadon de *Svisa Espero* (3 eldonoj) kaj parton de la Eo-elsendoj de SRI, laŭ rekomendo de →Edmond Privat. E. estis kvazaŭ Eo-stelo subite falinta de la ĉielo, lia kunlaboro estis tre fruktodona. E. estis konvinkita, ke Eo, kiu estis adorata de li kiel „simpla latino“, faciligus al la lernantoj ilian aliron al la klasika kulturo. Pro tio li esprimis la deziron, ke Eo iam ludu apartan rolon en la lernejoj programoj. Lia abrupta morto, kaŭzita de akcidento, sendube estis granda perdo por la tiama Eo-movado. La ekspozicio pri Edmond Privat kaj Charles E. en la supera komerca lernejo de Neuchâtel en 1963 ne maltrafis la adekvantan intereson de la publiko.

→Neuchâtel →Svisa Esperanto-Societo →Radio
→Instruado

EKZAMENOJ

→Instruado de Esperanto en Svislando

Marcel ERBETTA

1911-1996



Post la porinstruista lernejo en Porrentruy (1927-31) E. laboris unue en Lippe-Detmold (Germanio, 1931) kaj en Orienta Prusujo (1932), kie li fakiĝis pri germana lingvo. Poste li laboris en orfejo en Courtelary kaj en Saint-Imier (1932-45) en la Berna Ĵuraso antaŭ ol komenci la instruadon en la baza popola lernejo en Biel-Bienne (ekde 1945), kien li translokiĝis kun sia edzino kaj la tri

gefiloj. Ĉi tie liaj rilatoj kun la pedagogiaj medioj de la dulingva urbo, la aktivado en la Romanda Pedagogia Societo kaj en la komisionoj de la socialdemokrata partio estis tre fruktodonaj.

E. aliĝis al la Eo-movado komence de la 1950aj jaroj pere de sia pedagogia aktiveco kadre de la Freinet-movado kaj ĉar lin interesis la demandoj de la kunlaborado inter infanoj cele al paca edukado kaj pli bona vivkompreno. En 1951 li aliĝis al Eo-kurso, organizita de →Bruno Graf en Biel-Bienne, kaj jam la postan jaron li utiligis Eon por interlernejaj interŝanĝoj. Regule li ĉeestis la semajnfinojn de EJS kaj poste de EES. Internacie konata E. fariĝis, kiam li lanĉis internacian kampanjon por interlerneja Eo-instruado sub la nomo →*Graĵnoj en vento*. Ĉi tiun agadon, kiu havis elstaran didaktikan signifon por la Eo-instruado, E. gvidis dum dudeko da jaroj. En julio 1958 li organizis internacian pedagogian renkontiĝon en Broc/FR sub la aŭspicio de la Freinet-movado kaj kun la partopreno ankaŭ de e-istoj.

Kiam E. senkuraĝiĝis pro malbona farto post motorbicikla akcidento, la emerito iom post iom forlasis sian poresperantan agadon, despli ĉar neniu pretis transpreni la torĉon, kaj la projekto Graĵnoj en vento finfine ĉesis ekzisti.

Ankaŭ liaj familianoj (la edzino Mariette kaj la filinoj Lucienne kaj +Jacqueline) partoprenis diversmaniere la Eo-aktivecon de E.

→Graĵnoj en vento →Instruado →Politiko →KCE

ESPERANTO-EDUKISTARO DE SVISLANDO (EES)

→*Instruado de Eo en Svislando*